



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj - ESPERANTO NORMANDIE

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 8 Eŭroj Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

La différence essentielle

La différence **essentielle** entre l'anglais et l'espéranto, il convient de le rappeler sans relâche, réside dans le fait que **l'espéranto n'a pas d'armée**, pas de territoire, pas **d'état** auquel il soit lié, ce qui **réduit pratiquement à néant la possibilité d'en faire un outil d'asservissement ou de manipulation idéologique**, culturelle etc... (puisque chacun peut s'en saisir, se l'approprier...)

C'est hélas aussi **sa principale faiblesse**, puisque les Etats, qui, eux, possèdent territoire, armée et force économique, **refusent aveuglément** de le soutenir, tout préoccupés qu'ils sont de leurs **propres pouvoir, expansion et influence**. Et j'ajoute, évidemment, qu'une autre différence importante réside dans sa **régularité**, qui loin de nuire à la richesse de cette langue, constitue **la base logique qui permet à TOUS de l'acquérir en 5 à 10 fois moins de temps que toute langue "nationale"**.

Quitte à sembler radoter, je pense qu'il faut enfoncer le clou, parce que cela semble si incroyable à la plupart des gens (même les plus intelligents et curieux), que cette méconnaissance est un facteur important du malentendu qui éloigne de nous certains "sceptiques", pourtant authentiquement démocrates, et parfois de gauche...

Henri MASSON

"Bilingue? Mon c..." comme dirait Zazie

"Il est sûr qu'aujourd'hui, ne pas être bilingue, c'est-à-dire parler sa langue maternelle plus l'anglais, est discriminant pour l'entrée dans la vie active."

Voilà ce qu'on peut lire sur le site de "Rue des entrepreneurs" (France-Inter).
Autrement dit, si vous parlez deux langues MAIS QUE L'UNE DE CES LANGUES N'EST PAS L'ANGLAIS, on ne vous considère pas comme bilingue!
Supposons que vous parliez français ET italien, ou français ET allemand, voire même français italien, ET allemand. C'est pour du beurre. Vous êtes nul de chez nul.
Ne cherchons même pas à supposer un locuteur de français, espéranto, allemand, italien ET espagnol (si si, je suis sûr que ça existe!)

De plus, que cherche-t-on à nous faire gober? Que le moindre boulanger, tourneur, magasinier de supermarché, agriculteur, que sais-je encore, a un incontournable besoin de connaître la langue impériale?

Fatalité ou manipulation? Et on osera nous dire qu'il ne s'agit pas **d'idéologie?**

Portrait : Renato Corsetti

Nous sommes divers, hommes femmes de tous milieux, de toutes convictions. Certains croient en Dieu, et d'autres pas. Nous comptons en nos rangs des conservateurs un peu rigides, des Centristes, des Socialos, des Verts et des libertaires. Sans compter quelques "sans opinion". Il y a des gros, des maigres, des blonds et des brunes...

Pour le premier entretien numérique, j'ai visé "haut": rien moins que **l'actuel président de l'UEA** (Association mondiale d'espéranto). Il ne vous est sans doute pas connu, et pourtant il est célèbre auprès de millions d'êtres humains.

Sro Corsetti est né en 1941, a étudié l'économie et la linguistique, travaillé dans le domaine bancaire, et il est actuellement professeur de psycholinguistique à l'université de Rome.

Professeur Corsetti, pourquoi et quand avez-vous appris la "Langue Internationale"?

J'ai commencé à apprendre la Langue Internationale car, quand j'étais jeune, je m'intéressais aux langues et j'ai commencé de m'initier à quelques-unes en autodidacte. L'espéranto est tellement facile, qu'on arrive non seulement à s'y initier, mais qu'on l'apprend rapidement à fond.

Pourtant, je suis resté espérantiste non à cause des qualités de la langue internationale, mais à cause de la compréhension du potentiel politique de l'Espéranto pour une libération mondiale des impérialismes culturel et linguistique.

Quelles autres langues parlez-vous?

Eh bien, je parle sans problème en espéranto et en italien normalisé. J'ai maintenant quelques petits problèmes avec ma véritable langue maternelle, le dialecte de mon village d'origine, bien que je parle encore celui-ci de temps en temps.

Je peux parler avec quelques problèmes en français, anglais et espagnol.

Avec de plus en plus de problèmes en allemand, et avec de grands problèmes, en deux trois autres.

Je peux lire de nombreuses langues, mais ceci est bien plus facile.

Quelle est votre profession?

Psycholinguiste. Donc, nous restons toujours dans le même domaine.

Désirez-vous ajouter quelque chose au sujet de l'espéranto ou de n'importe quel autre sujet?

Je crois que les français ne comprennent pas que l'espéranto est leur allié, quand il s'agit de la défense du français. Aucune langue ne peut se sauver toute seule. Il n'y a que si nous essayons de sauver tout le monde de la logique: empire -> langue impériale, que nous aurons quelque chance de succès. En d'autres termes, le français ne peut se sauver que si l'allemand, l'espagnol, le kazakh et le breton se sauvent en même temps que lui.

NI RIDETU

Mi konis ulon, kies edzino estis tiom magra, ke, iam, baniĝante, ŝi preskaŭ englutiĝis en la elfluilon de la banujo !

- Oh, mi, mi konis ulon kies edzino estis tiom magra ke ŝi povis fari al si robojn el la kravatoj de sia edzo !

- Nenio estas ! Mi konis ulon kies edzino estis tiom magra, ke iam dum manĝo kun geamikoj, ŝi akcidente glutis ĉerizkernon, kaj la amikoj miris : " Ni ne estis rimarkintaj ke vi estas graveda !"

Sendita de Henri Rousseau

RAPPORTS FINANCIERS ANNEE 2004

Union des Espérantistes de Normandie CCP 283 40 H Rouen

RECETTES	DEPENSES
Au CCP le 1 / 1/ 2004	1537,52
	Bulletins 218 à 221 508,16 Taxe CCP 2,10
Total des Recettes (Cotisations et Dons)	0722,00
	Total des Dépenses 510,26
	Au CCP le 31/12/2004 1749,26
BALANCE :	2259,52
BALANCE :	2259,52

Remarques:

Durant l'année 2004, nous avons perçu 1 cotisation pour 2002 +7 pour 2003 +58 pour 2004 + 18 pour 2005
En résumé, il y a eu 77 cotisants en 2002, 77 en 2003, 69 en 2004 (plus quelques retardataires)

Fédération Normande d'Espéranto France (U.F.E.) CCP 2348 06 C Rouen

RECETTES	DEPENSES
Au CCP le 1/1/2004	1004,07
Ristournes sur cotisations UFE	122,50
	Taxe CCP 2,10 Timbres poste 15,00
	Au CCP le 31/12/2004 1109,47
BALANCE	1126,57
BALANCE :	1126,57

Remarque:

En 2002: 28 adhérents à Esperanto-France

En 2003: 26

En 2004: 23

Ces comptes sont approuvés par le contrôleur Pierre JOUVIN 14 rue Thiers 76120 Grand Quevilly

CU VI PAGIS VIAN ABONON POR 2004 ? (lasta listo)

Listo de pagintoj : Gesinjoroj Bachimont, Bataille, Bessière, Bettencourt, Blactot, Bonnet, Caron, Chalm, Colombel, Corrieu, Defrance, Dubois, Dubuc, Dufeu, Duflo, Dufossé, Dufresne, Duhamel, Duval, Erhard, Esp. Cotentin, Evrard, Freslon, Gibert, Guérault, Guerre, Guilmoit, Haulard, Hébert, Helbert, Hubert, Huet, Jourdaïne D., Jourdaïne M.L., Jouvin, Klein, Lamy, Lebrun, Lecouvreur, Leguillon, Lehericey, Lemarchand, Leprévost, Leroy, Lesueur, Levesque, Levy, Loisel, Magerel, Marie F., Mary P., Michaud, Millet, Moyon, Nardin, Nicolas, Paumier, Père Marc, Poupinet, Quillaud, Rauch, Robiollé, Rolland, Rousseau, Sénécal, Séry, Tailpied, Tanguy, Tierce, Touileb, Turmel, Zilliox.

Si votre nom ne figure pas dans la liste ci-dessus, veuillez nous faire parvenir votre cotisation. Dankon !

KOTIZOJ POR 2005 :

Listo de pagintoj : Gesinjoroj : Bachimont, Bataille, Caron, Chalm, Colombel, Dubois, Dufeu, Duflo, Dufresne, Dufossé, Duval, El Bahri, Esp.Cotentin, Evrard, Freslon, Guérault, Huet, Jean, Hébert, Helbert, Lecouvreur, Lehericey, Lemarchand, Leprévost, Leroy, Lesueur, Lévy, Loisel, Michaud, Millet, Moyon, Nardin, Nicolas, Quillaud, Rolland, Schertzer, Séry, Tailpied, Tierce, Turmel,

Miĥaelo atingis Heruvil post longa turneo en Nederlando, Belgio, Luksemburgo kaj Francio. Sed li estis freŝa kiel ĵus naskita bebo (bebo kun barbo). Lia restado en nia urbo estis mallonga, kaj konsekvence iom hasta ! Sed, ĉiam li estis preta por nova vizito, por vespero en restoracio, por respondado al probable jam multfoje faritaj demandoj. Lia prelego pri Vorkuto multe interesis la ĉeestantojn (iom pli ol 30, grandparte esperantistoj) .Tiu raporteto pri lia restado en nia urbo respegulas tiujn de la aliaj kluboj.

Al ĉiuj plaĉis la prelegoj kaj la bonhumoro de Miĥaelo.

En Le Havre, oni diras ke la prelego estis pedagogia kaj la preleganto tre atentema pri la publiko. En Thionville, oni asertas : " Tre bona koncerto (...) La publiko aplaŭdis Miĥaelon. La koncerto kaj prelego daŭris du horojn !" En Rouen, li ankaŭ prelegis pri Vorkuto kaj kantis en diversaj lingvoj ; tio plezurigis ĉiujn , eĉ ne esperantistojn. La franclingva raporto de Dijon indikas : *"J'ai beaucoup apprécié Mikaelo. et son aisance à faire participer le public"* Sama etoso en Châlons sur Saône kie la prelegvespero finiĝis per glaseto da pola vodko. En Angers, oni konstatis ĝeneralan kontenton pri la koncerto. Sama opinio en Metz kie la grupo havis tre interesan ideon : ĝi celis apartan publikon, nome la lokan judan asocion; venis 45 membroj de tiu asocio kaj ankaŭ 15 esperantistoj ; Miĥaelo kantis jide, hebree kaj esperante. En Thionville, alvenis 50 personoj, inter kiuj du trionoj ne estis esperantistoj; La prelego okazis en la "Médiathèque" kun partopreno de loka asocio "Forum des Citoyens". En Hérouville, la prelego estis anoncita de la loka esperanto - asocio sed ankaŭ de la loka asocio "Amikeco kun Tiĥvino", ĝemela urbo kun Hérouville.... kaj urbo kie loĝas Miĥaelo (la esperantistaj kluboj de ambaŭ urboj rilatas jam de 1991). La renkontiĝo en Angers estis multnombra ; ankaŭ venis esperantistoj de Tours kaj Le Mans, entute 78 personoj. La publiko en Rouen/Grand Quevilly konsistis el 15 homoj el kiuj duono esperantas. Ankaŭ 15 esperantistoj en Le Havre (du venis de Yvetot.)

La gazetoj ĝenerale anoncis la publikan kunvenon kaj raportis, sed tute ne en Rouen kaj Dijon. Tro mallonge en Angers. Bona artikolo en Hérouville (Ouest France). Du artikoloj en "Républicain Lorrain" por Thionville Kaj, du informoj en la juda bulteno de Metz.

Konkludo : tiu turneo kontentigis la grupojn pro la kvalito de la prelegoj de nia amiko, pro lia kapablo tre amike rilati kun ĉiuj. Alvenis sufiĉe da spektantoj, sed ni esperis pli da gazetraportoj.

Dankon al ĉiuj grupoj kiuj bone rilatis inter si. Okazis neniuj malfruo, neniuj miskompreno, neniuj malagrablaĵoj.

Mi esperas ke vi baldaŭ povos denove akcepti novan preleganton.

Yves NICOLAS
(Turneorganizinto)

KUNVENO DE LA NORMANDA ESTRARO :

Le Conseil d'Administration de notre association normande s'est réuni le Dimanche 6 Mars à Hérouville.

Etaient représentés les groupes de Hérouville, Caen, Cherbourg, Rouen/Grand Quevilly.

Le Trésorier fit un bref compte rendu de la situation financière de nos 2 associations.

Une grande partie de la réunion fut consacrée à la réorganisation de notre région espérantiste.

Une discussion s'engagea : une structure régionale est elle nécessaire entre les mouvements nationaux et les clubs locaux ? Serait il préférable d'avoir une région Haute Normandie et une région Basse Normandie ? Il fut souligné l'importance de "Normanda Bulteno" qui est un lien indispensable entre les membres isolés. Il fut aussi décidé d'intensifier les rencontres inter-groupes.

Actuellement, nous avons 2 associations normandes déclarées : "La Fédération Normande des Centre Culturels Esperanto" et l'"Union des Espérantistes de Normandie". Ces deux associations ont le même but et le même Conseil d'Administration. Cette dualité qui était justifiée, il y a quarante ans est devenue tout à fait anachronique et particulière à la seule Normandie !

Nous envisageons donc de supprimer ces 2 associations et de les remplacer par une association dont le nom sera officiellement "ESPERANTO NORMANDIE" avec de nouveaux statuts.

A cet effet, une Assemblée Générale extraordinaire est prévue pour le **Dimanche 19 Juin 2005**

Nous vous demandons de réserver cette date sur votre agenda.

Il vous sera adressé des informations concernant la tenue de cette assemblée et un texte des statuts proposés.

NI RIDETU :

- Mi konis iun, mi, kiu kuris tiel rapide ke iam, kun mi kaj aliaj amikoj, li nekonate superis la mondan rekordon !

- He ! Kaj mi, mi konis ulon kiu kuris tiel rapide, ke iam li lasis fali siajn ŝlosilojn de sia loĝejo ĉe 9a etaĝo, kaj li alvenis malsupren sufiĉe rapide por ilin ricevi en sia ĉapo !

- Estas nenio ! Mi konis ulon kiu kuris tiel rapide ke, kurante ĉirkaŭ arbo, li sukcesis sin atingi !

H.R.

ADRESARO 1909

La internaciaj asocioj, (SAT, UEA...) eldonas adresarojn. Ili estas utilaj por orientiĝi en la organiza strukturo de la E-Movado, por studi ĝian historion, por reklami nian lingvon. La unua adresaro estis publikita en 1888 en Varsovio kaj la Jarlibro de UEA ekde 1908.

En la arkivo de nia forpasinta samideano Véron (el Domfront), ni trovis Esperantistan poŝkalendaron de 1909. Ĝin eldonis en Berlino iu "Esperanto Verlag Möbeler und Borel" Sur la 2a paĝo aperas reklamo por "La Revuo, Internacia literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado de D-ro L.L. Zamenhof, aŭtoro de la lingvo Esperanto" kiun eldonis "Hachette kaj K-o, 79 Bvd St Germain, Paris"

La poŝkalendaro konsistas el dataro por la tuta jaro 1909 kun 2 datoj por la sama tago : la unua por la Gregora kalendaro ("malnova stilo" kiun sekvis la Rusoj ĝis la Oktobra Revolucio), la dua ("nova stilo, nia) por la Juliana. Por klarigi : la 19a de decembro 1908 en la malnova stilo, Gregora, iĝas la 1a de Januaro 1909 en la nova stilo, Juliana ! Amuze

Meze de la libro, legeblas prezento de la "Projektoj de lingvo internacia" laŭ sistemo "a priori" (kiel Solrésol muzika lingvo de Sudre en 1817), "miksitaĵ" (kiel Volapük de Schleyer en 1880), kaj "a posteriori" (kiel Esperanto, aŭ Pantos-Dimon-Glossa de L. de Rudelle en 1858).

Poste aperas la "Deklaracio pri Esperantismo, oficiala teksto de la Boulogne'a kongreso (1905 : 688 aliĝoj) kaj du paĝa alvoko partopreni la kongreson en Barcelono (1909 : 1500 aliĝoj). Diversaj informoj sekvas pri stenografio, monsisistemoj, titoloj de E - gazetoj (pli ol 170 revuoj de multaj landoj) .

La sekventa parto aperigas la adresaron. Ĝi konsistas el landoj kaj kolonioj (Alĝerio, Koŝinĥinujo, Tonkino...) de ĉiuj kontinentoj. Entute 40 . (Eble, vi diros : Nur 40 ? Sed la tiama situacio tute malsimilas al la nuna. Multaj landoj estis submetitaj de aliaj aŭ ne ankoraŭ ekzistis.) En Francio, estas grupoj en 188 urboj ! Tre interesa informo estas ke oni indikas la daton kiam la grupo estis kreita. Nome en Normandio :

Caen : la 4an de decembro 1905

Cherbourg : 28an de novembro 1905

Domfront : la 15an de julio 1908 (Sekcio de la Esp.Stelo de la 130a infanteria regimento !!!)

Elbeuf : en aprilo 1904

Granville : sen dato, Hambye : sen dato, Saint Lo : sen dato

Le Havre : la 8an de Majo 1902 (Prez. Emile Gasse)

Lisieux, Pont Audemer : sen dato

Rouen : 21an de aprilo 1904 kun indiko de Esperantista Hotelo en Bonsecours, apud Rouen

Sotteville lès Rouen : 11an de Novembro 1905 - Grupo Esperanta Stelo kun indiko de E- restoracioj

La esperantista poŝkalendaro 1909 finiĝas per amuzaj reklamoj : "Postdam, Restadejo de Lia Majesta Moŝto la Imperiestro de Germanujo kaj Reĝo de Prusujo", "Skribante al suba adreso, vi ricevos senpage artikolon pri monismo (religio fondita sur nuna scienco)...", "Elektraj lum-banoj kun alternanta fluo, por malgrasigo kaj samtempa fortigo de l'koro, - severa dieto ne necesa, multjaraj spertoj", "Skribmaŝino Polyglott", "Talismano, Germanujo, Saksujo, fabriko de plej delikataj parfumaĵoj kaj tualetsapoĵ", "Fry's, pure concentrated Cocoa estas ofte nomata la ideala trinknutraĵo ; la plej perfekta speco de kakao", "Gesamideanoj, Fumu nur la en Anglujo kaj Germanujo plej faman Cigaron holandan El Trafiko !", "La internacia trinkaĵo Viskio Esperanto, la oficiala viskio de la tria kongreso, Buchanan, Scott and Co, Glasgow" (La 3a kongreso okazis en Cambridge en 1907, kun 1317 aliĝoj), "Laborejo speciala por esplorado de homaj ekskrementoĵ, ... petu niajn instruojn por sendi vazojn kaj nian tute moderan tarifon afrankote ".....

Tiu adresaro, instruplena, konfirmas ke la movado tre viglis antaŭ la unua mondmilito, eĉ en Normandio, kie blovis bona vento, post la kongreso de Boulogne ĉe la maro. Kio okazis poste al tiuj lokaj grupoj kaj individuoj ? Angers, en 2004, festis la centjariĝon de sia loka grupo, ĉar ĝi estis bonŝanca posedi la arkivojn de la komenco ĝis nun. Sed kio restas en niaj normandaj grupoj pri tiu jam fora epoko ?

Yves NICOLAS

Por pliaj informoj pri nomoj kaj adresoj de prezidintoj de tiuj kluboj, bonvolu kontakti Yves

NI RIDETU :

- Mi konis ulon kiu estis tiel granda ke por skrapi sian kapon, li devis supreniri seĝon

- Kaj mi, mi konis ulon kiu estis tiel malgranda, ke por skrapi sian kapon, li devis surgenuiĝi

+ + +

- En mia regiono, estas fonto kies akvo estas tiel salubra, ke la puloj kiuj vivas apude, fariĝas samdimensiaj kiel ranoj !

- Estas nenio ! En mia regiono estas fonto kies akvo estas tiel salubra ke se vi mergas en ĝi sekan kaj salitan fiŝon, ĝi reviviĝas post dek minutoj !

+ + +

- Mi konis ulon kiu havis tiel akran vidkapablon ke li povis vidi muŝon kiu marŝis sur flugilo de pasanta avio !

- Kaj mi, mi konis ulon kiu havis tiel akran aŭdkapablon, ke cia muŝo, li aŭdis ĝin marŝi

KONGRESOJ, STAĜOJ, RENKONTOJ en 2005

Esperanto-Renkontiĝo en Boulogne sur Mer de 25a ĝis 30a de Marto

Kiam vi ricevos nian normandan bultenon, kelkaj el vi estos tuj partoprenontaj la centjariĝon de la unua Universala Kongreso. Ni deziras grandan sukceson al tiu grava evento.

La 90a Universala Kongreso okazos en Vilnius (Litovio) de la 23a ĝis la 30a de Julio. Petu informojn kaj aliĝilon de kongreso, antaŭ- kaj post- kongreso al Esperanto France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris

La 78a S.A.T. kongreso okazos en Zagreb (Kroatio) de la 2a ĝis la 9a de Julio. Petu informojn kaj aliĝilon de kongreso kaj post-kongreso al SAT, 67 Avenue Gambetta 75020 Paris

La Kongreso de TEJO (junulara movado) okazos en Zakopane (Polio) de la 31a de Julio ĝis la 7a de Aŭgusto

La Ekumena kongreso (Katolikoj de IKUE kaj Protestantoj de KELI) okazos en Piliscaba (Hungario) de 16a ĝis 23a de Julio

Se vi ne povos partopreni kongreson dum 2005, bonvolu jam noti ke :

Universala Kongreso okazos en **Firenze (Italio) en 2006**

Universala Kongreso okazos en **Yokohama (Japanio) en 2007**

FERIEJOJ

Internacia renkontiĝo en Plouëzec (Côtes d'Armor) dum Aŭgusto

Internacia semajno kun kursoj en Sète de la 20a ĝis la 27a de aŭgusto

Regiona staĝo en Saint Nazaire 4a kaj 5a de Junio. Informo : Solange Goan Tél. 02 40 31 02 56

STAGES D'ETE AU CHATEAU DE GRESILLON

La Maison Culturelle de l'Espéranto organise des stages d'une semaine durant les mois de Juillet et Août 2005

Tous les stages comprennent des cours de 3 degrés avec des professeurs français et étrangers. Ils sont complétés par diverses activités de loisirs, de tourisme et des conférences

Les stages commencent le samedi à 19 h et se terminent le samedi suivant au repas du midi

Adresse : Maison Culturelle de l'Espéranto F - 49150 BAUGE Tél. (avec répondeur) 02 41 89 10 34

Site Internet : <http://gresillon.org>

Courriel : grezijono.kastelo@free.fr

ESPERANTO CENTRO KVINPETALO

Rue du lavoir 86410 Bouresse

Tél. 05 49 42 80 74

Courriel : informoj@kvinpetalo.org

Tiu centro situas inter Poitiers kaj Limoges

Venontaj staĝoj : 19a/23a de Aprilo : Preparado al la 2a parto de kapableco

26a/30a de Aprilo : La kontribuo de esperanto al paco ; ĝia beletra esprimiĝo

Skribu por koni la sekvon de la programo

PROPONO DE PASTRO DUILIO MAGNANI

En sia letero Pastro Magnani memorigas ke Papo Johano Paŭlo la dua, de dek jaroj, aldonas esperantlingve sian salutmesaĝon al la tuta mondo okaze de Pasko kaj Kristnasko.

Li proponas ke ĉiuj esperantistoj, -eĉ ne-kredantoj aŭ alireligianoj, aŭdigu sian dankon per letero, eĉ mallonga, adresita al lia Eminenco SODANO kard. Angelo, Ŝtasekretario 00120 CITTA DEL VATICANO

Li opinias ke se miloj da gratuletoj atingos tiuokaze Vatikanon, la jam favora sinteno al Esperanto pliboniĝos kaj eĉ povus fariĝi deirpunkto por pripensi eksperimenton kaj eĉ la adopton de la neŭtrala lingvo en la katolika Eklezio kiu, ne plu uzante la latinan lingvon, nepre bezonas neŭtralan lingvon Esperanto, ĉar ne eblas preferi diskriminacie en la Liturgio nur kelkajn naciajn lingvojn.

Li sugestas danki la ŝtasekretariejon pro la papaj mesaĝoj kaj ankaŭ mencii kaj gratuli ĝin pro la Esperanto - elsendoj de Vatikana Radio trifoje semajne, la aprobon de la Meslibro kaj la oficialan rekonon de IKUE fare de la Pontifika Konsilio por la laikoj

Li skribas : Tiu-ĉi propono atingu eĉ la gesamideanojn de aliaj kristanaj kredkonfesioj (Esperanto, ekumena lingvo) tiujn de la aliaj religioj, la ne-kredantojn kaj la ateistojn. Des pli bone se ili sin deklaras tiaj. Se lavango da esperantistaj leteroj el ĉiuj kontinentoj atingos Vatikanon, blovos nova lingva vento ĉe la centro de la katolikaro kun certa influo ankaŭ ĉe la civilaj institucioj. Neniu forgesu sian adreson por ricevi respondon

Li esperas ke tiuĉi propono estu ŝatata de la tuta samideanaro kaj li dankas ĉiujn pro la afabla atento

Pastro Duilio Magnani (en Rimini)

Tiu-ĉi propono daŭre valoras malgraŭ malbona sanstato de nuna Papo kaj ankaŭ okaze de elekto de nova Papo